

# NORDFRANCA

# ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio  
kaj de la Grupoj

REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements  
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo : 33, rue Marceau  
ROSENDAEL - LEZ - DUNKERQUE ( Nord )

C. VERNAY, Direktoro

G. VANHOVE, Administranto

M. DELAVIGNE, Respondeca redaktoro

*Redakta Komitato, redaktas*

Jarabono : Francujo 10 frankoj  
aliaj landoj : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro  
POSTĈEKKONTO : LILLE 403-50

**Les bonnes adresses  
de Dunkerque :**

## A L'IMPECCABLE

VÊTEMENTS

5, Place Jean-Bart - DUNKERQUE  
...l'ami des Espérantistes

## Le "Café du Centre"

39, Place Jean-Bart, DUNKERQUE

...réserve le meilleur accueil  
aux Espérantistes

Ejo de la sabataj Kunvenoj de la grupo  
(18-30 / 20-30)

*Esperanto parolata*



## Les bonnes adresses d'AMIENS...

**Pharmacie Centrale  
Saint-Leu**

**R. DESCAMPS**

*Pharmacien de 1<sup>re</sup> classe*

59-61, Rue Saint-Leu - AMIENS  
(face l'Église) Tél. 22-83

**Manufacture de Vêtements  
A FAÇON  
pour Hommes, Jeunes Gens, Enfants**

**M. CHANTRIAUX & F. LABONNE**

8. à fr. L. Capital 40.000 fr.  
34, Rue de l'Amiral-Lejeune  
AMIENS

**Les Bières "LE COQ BLANC" sont les plus réputées dans la région**



La plej bonaj JUVELOJ  
Poŝ-, Sonoril-, kaj Vekhorloĝoj  
por plej malaltaj prezoj

"AU BEFFROI"

**A. HERVIEU**

24, rue des Chaudronniers - - AMIENS

**OPTIQUE MÉDICALE**

**G. GUIBERT**

*Opticien - Lunetier*

33, Rue Allart - AMIENS

Téléph. 15-67

ESPÉRANTISTE

# NORDFRANCA ESPERANTISTO

Monata Revuo de la Nordfrancaj Esperantistoj

PROPAGANDO ★ INSTRUADO ★ AKTUALAĴO ★ LITERATURO  
PROPAGANDE ★ ENSEIGNEMENT ★ ACTUALITÉ ★ LITTÉRATURE

Kopirajto de la enhavo rezervita. Manuskriptojn kaj sciigojn oni devas sendi nur al tiu-ĉi adreso : **C. VERNAY, MALO-LES-BAINS** (Nord). Ni ne resendas la manuskriptojn. — La Redakcio rezervas al si la rajton korekti laŭbezone la manuskriptojn. — *Les auteurs sont seuls responsables de leurs articles.*

## Niaj Grupoj...

### Esperantista Grupo en Saint-Omer

La Esperantista grupo, fondita en 1902 de S-ro Deligny, estas la sola, laŭ nia opinio, el la grupoj de la Federacio (eĉ eble el la francaj grupoj), kiu funkciis seninterrompe kaj sub la sama direkto de sia fondiĝo ĝis nun.

Jam, en 1901, kvin loĝantoj de tiu urbo aliĝis al la Franca Societo Esperantista, kaj S-ro Deligny estis tuj malferminta kurson. En 1902, la grupo estas organizata kaj, dum decembro, S-ro Bourlet faras, en la urba teatro, paroladon pri Esperanto kun tre granda sukceso. Du kursoj funkcias, unu por la sinjoroj, alia por la sinjorinoj.

Postan jaron, 1903, esperantista ekspozicio, la unua verŝajne, estas organizita dum la kermeso kaj akceptas multnombrajn vizitantojn. En oktobro, nova parolado de S-ro Michaux. La du kursoj funkcias ĉi-semajne kaj regule funkcios dum la sekvontaj jaroj.

En 1904, la grupo partoprenas la unuan internacian kunvenon en Calais, 7<sup>an</sup> kaj 8<sup>an</sup> de aŭgusto. En oktobro, ĝi helpas la kreon de grupo en la liceo, kie tuj du kursoj estas organizitaj.

En 1905, la grupo partoprenas la unuan universalan kongreson en Boulogne, kaj, kun la helpo de kelkaj bulonjanoj, S-ro Deligny organizas esperantan ekspozicion tre riĉan. Dum la sama jaro, la grupo ricevas de la Urba Konsilantaro subvencion de cent frankoj, kiu estas denove voĉdonita ĉiujare, krom dum la milito.

Dum la postaj jaroj, kvar kursoj funkcias regule : du en la urbo kaj du en la liceo.

En 1908, la 28<sup>an</sup> de junio, fondiĝas la Nordfranca Federacio Esperantista. La grupo partoprenas kaj la 25<sup>an</sup> de novembro aperas en Saint-Omer, sub la direkto de S-ro Deligny, la federacia bulteno *Norda Gazeto*, kiu aperos ĝis julio 1914 kaj reaperos poste, en 1931.

En januaro 1909, kurso estas kreita en urba unuagrada lernejo : ĝi daŭros ĝis la milito. Saman jaron, esperantistaj festoj okazas en la urbo kaj en la liceo. La 1<sup>an</sup> de decembro, S-ro Sergeant paroladas en Saint-Omer pri Esperanto antaŭ multnombra aŭdantaro.

En 1910, la grupo ricevas oficialan apogon de la Urba Konsilantaro, de la Komerca Cambro kaj de la Iniciativa sindikato. La Komerca Cambro disponigas por la grupo, senpage, hejtatan kaj lumigatan ejon por la kursoj. En tiu sama ejo okazas nun ankoraŭ la kursoj.

En 1911, por prepari la federacian

kongreson deciditan en Saint-Omer por la posta jaro, la grupo organizas daŭrigan ekspozicion, kies dokumentoj estas renovigitaj dufoje en la monato.

La 23<sup>an</sup> de junio 1912 okazas en Saint-Omer la kvara kongreso de la Federacio, sub la prezido de S-ro Rollet de l'Isle; granda sukceso, akcepto en la urbdomo, bankedo, ŝipekskurso en la belan regionon « Norda Venetio ». Tre riĉa ekspozicio estis organizata je tiu okazo.

En 1913, ĉe la konkurso Michelin, inter 379 laŭreatoj, 9 membroj de la urba kaj licea grupoj ricevas premion.

En 1914, S-ro Deligny organizas en la liceo, kun la helpo de la urba grupo, konkurson, kies du unuaj premioj konsistas en vojaĝo al la kongreso en Parizo.

Dum la milita periodo, la kursoj estas neregulaj, sed la anoj kuniĝas de tempo al tempo. S-ro Deligny akceptas multajn Esperantist. anglajn, kanadanajn, amerikanajn, novzelandajn, kiuj trapasas la urbo aŭ loĝas en ĝi.

En 1921, la kuniĝoj reorganizigas; du kursoj okazas en la urbo kaj en la liceo. Granda konkurso estas preparata en la liceo: la unua premio konsistanta en vojaĝo al Praha, por ĉeesti la universalan kongreson, estas gajnita de la juna André Pruvost, kiu partoprenas la kongreson. Ok membroj de la urba grupo faras la saman vojaĝon sub la direkto de S-ro Deligny.

La 25<sup>an</sup> de majo 1924, la Norda Federacio estas reorganizita.

En 1925, ĉio regule funkcias. De la 20<sup>a</sup> de septembro ĝis la 11<sup>a</sup> de oktobro estas malfermata, en la Komercia Cambro en Saint-Omer, belega ekspozicio esperantista, aranĝita de S-ro Deligny, kun liaj personaj dokumentoj. Jaŭde posttagmeze kaj dimanĉe, multnombraj vizitantoj admiras la riĉaĵojn.

En 1927, la 27<sup>an</sup> de majo okazas en Saint-Omer la oka federacia kongreso, sub la prezido de ĝenerala intendanto Bastien. Pli ol 100 esperantistoj, inter kiuj kelkaj fremdlandanoj ĉeestas. Akcepto en la Urbdomo,

bankedo, surŝipa ekskurso en Clairmarais, ekskurso en la tiea arbaro kontentigas ĉiujn.

La du kursoj funkcias regule; en la liceo, la premioj de Esperanto estas enskribitaj sur la premi-nomaron.

Norda Gazeto reaperas en Saint-Omer la 15<sup>an</sup> de februaro 1931. La 26<sup>an</sup> de julio, la grupo partoprenas la federacian kongreson en Boulogne. S-ro Deligny inaŭguras la placon Zamenhof kaj prononcas la inaŭguran paroladon. De la 29<sup>a</sup> de aŭgusto ĝis la 10<sup>a</sup> de septembro, S-ro Deligny organizas en la granda halo de la ĵurnalo *Le Télégramme*, en Boulogne, esperantan ekspozicion, kiu allogas multnombrajn vizitantojn.

En 1932, la Iniciativa Sindikato proklamas de nove la utilon de Esperanto kaj enskribas S-ron Deligny en sian komitaton, kiel prezidanton de la Esperantista Grupo.

En februaro 1933, la Iniciativa Sindikato de Saint-Omer presigas en Esperanto kvarpaĝan ĵurnaleton ilustritan pri la urbo. Tiu ĵurnaleto estas sendita pere de la grupo al ĉiuj francaj grupoj kaj al multaj fremdaj esperantistoj. Multnombraj gratulaĵoj kaj dankaj kartoj pravas la sukceson de tiu presajo.

La 20<sup>an</sup> de aŭgusto de la sama jaro, la grupo organizas por la federacianoj feston « Esperantista Tago ». Ekskurso al Clairmarais, vizito de la Muzeo kaj de la Komercia Foiro, kie la Esperantistoj estas oficiale akceptitaj kaj ricevas ekzempleron de la bele ilustrita gvidlibro de la urbo. Dum la koncerto, la himno *La Espero* estas kantita de F-ino Rollet, kun akompano de la orkestro.

En 1934, la grupo organizas de nove la federacian kongreson, kiun partoprenas 200 esperantistoj de ok malsamaj nacioj. Akcepto en la Urbdomo, bankedo prezidita de S-ro Tabart-Robert, sub-prefekto, kiu paroladas esperante; vizito de la Muzeoj, de la Ekspozicio de la urbaj artistoj, teatra festo organizita de la grupo de Dunkerque. La festo finiĝas per dancado.

La Urba Konsilantaro, krom la

jara subvencio de 100 frankoj, donacis sumon de 750 frankoj por la organizado.

Fotografia konkurso, dotita de multaj premioj, tre bele sukcesis.

Matene, je 11<sup>h</sup>30, en la ĉefpreĝejo meso estis farita de Pastro Kao, ĉina esperantisto, kaj prediko en esperanto kaj en franca lingvo estis prononcita de Pastro Decoën, belgu Redemptoristo. Dum la meso, la ĉeestantoj aŭdis kun granda plezuro la himnon *La Espero* luditan sur la fama orgeno. La grandega preĝejo estis plenplena.

En aŭgusto 1934, la Grupo organizis, en la Komercia Foiro, standon

sub la nomo « Esperanto por la turistoj kaj kolektistoj » kun ekspozicio de poŝtkartoj el 80 malsamaj landoj.

Dum septembro 1935, en la Komercia Foiro, la Grupo havis denove standon « Esperanto, lingvo de komercio kaj turismo ».

Finante, ni diru, ke dum tiuj jaroj kaj ĝis nun, kursoj de Esperanto funkciis en la urbo kaj en la liceo kaj ke ofte ambaŭflanke, esperantistaj festoj tre sukcesaj permesis distri la societanojn kaj danki speciale la honorajn membrojn pro la apogo, kiun ili donas al nia kara Grupo.

## Literatura angulo.

Okazas kelkfoje, ke ni renkontas en nia lingvo certan esprimon aŭ regulon, kiu ne tute — foje eĉ tute ne — plaĉas al ni.

Komence, kiam nia lingvo ekvidis la lumon de l' bela mondo, kiam ĝin atakis la kritikemaj homoj, tiam nia Majstro devis multe, multege skribadi por pravigi sian verkon. Unu deziris ŝanĝi tiun vorton, alia tiun, tria harfendadis pri gramatika regulo, kiu ne ŝajnis al li absoluta kaj fine, eble la plej saĝaj, petis konsilojn pri gramatikaĵoj.

Al ĉiu respondis Zamenhof. Ĉiam zorge, detale kun tia amo kaj miriga klareco, ke oni ĉie retrovas lian spiriton tiom admirindan. Pli ol cent respondoj aperis en diversaj esperanto-gazetoj. Poste oni kolektis ilin laŭ logika ordo kaj tiel estiĝis unu el la plej valoraj verketoj: *Lingvaj Respondoj* (lasta eldono, 116 p.; 7,50 fr. fr.)

Plezure, oni legas tiujn respondojn, ĉiam trafajo, tre klarajn kaj pli certan pri la ĝusta konstruo de nia lingvo, pli danki al ĝia kreinto estas tiu, kiu konas ĉi-tiun verketon.

Ankaŭ tre valora por nia literaturo estas la *Proverbaro Esperanta*. La patro M. F. Zamenhof kolektis ilin el rusa, pola, germana kaj franca lingvoj, nia Zamenhof tradukis kaj aranĝis ilin tiamaniere donscante tre legindan libron (*L.R.* 82 p.; 7,50 fr. fr.)—S.

## PENSO

Katenoj estas el oro kiam oni ilin rigardas, el plumbo kiam ili kateuas vin, el ŝtalo kiam oni volas ilin disrompi.



**Mi ridetas, ĉar jus mi:**

**Unue** : sendis mian ALIĜON al F-ino COLLEATTE por la **AMIENSA KONGRESO**;

**Due** : varbis **DU NOVAJN ABONANTOJN** al **NORD-FRANCA ESPERANTISTO**.

**...kaj vi ?**





# Ni ! la Komencantoj !

Aŭskultu ! Aŭskultu ! karaj ge-komencantoj. La Verda Kato kiu ĝis nun parolis regule al vi ĉi-tie faras longan vojaĝon kaj ne povas skribi por vi ; ĝi baldaŭ revenos, sed ĝi deziras ke vi povu legi ion similan, atendante ĝian revenon, kaj la direktoro postulis de mi ke mi parolu al vi.



Ho ve ! miaj karaj ! Mi sentas min tute ne taŭgan, sed mi devas obei, do mi obeas...

## La Provizora Kato.

— Bonan vesperon, karaj ge-amikoj ! kiel vi FARTAS ?

— Bonan vesperon, S-ro Bonkap, ni fartas tre bone, dankon. Ĉu ankaŭ vi ?

— Jes, mi dankas. Mi vidas ke vi ĉiuj diligente ĈE/ESTAS la kunvenojn. Mi ĝojas pro tio. Baldaŭ vi FAR/IGOS bonegaj esperantistoj kaj vi povos TRAPASI ekzamenon ; tio estas la « Atesto pri Lernado ».

Ĉu vi estus kontentaj trapasi tiun ekzamenon ?

— Ho jes, sinjoro, sed ĝi estas malfacila !

— Ne, geamikoj, se vi kuraĝe lernas, se vi elegante parolas, tiu ekzameno estos tre facila. CETERE mi scias ke vi estas kuraĝaj, kaj ankaŭ ke vi amas la esperantan lingvon. Ĉu ne ?

— JES JA, sinjoro, Esperanto estas bela lingvo. Ĝi estas la lingvo de la amo.



— Bone, Bone ! certe vi sukcesos ! sed, diru al mi ĉu ni havas hodiaŭ belan veteron ?

— Tute ne ! Pluvas, eĉ pluvegas. Vidu kiel niaj vestoj estas malsekaj.

— Ĉu vi ne havas PLUV/ombrelon ?

— Ne, mi ne ŝatas havi pluv-ombrelon en la mano. Ni preferas SUR/METI pluv/mantelon, sed la pluvo tamen MAL/SEK/IGAS nin.

— Ĉu vi preferus neĝon ?

— Ho, jes ! la neĝo estas GAJ/IGA. Lastan monaton, kiam multe da neĝo falis kaj kovris la teron, ni gaje ludis per neĝ/buloj... kiaj bataloj ! Eĉ kelkaj el ni konstruis neĝ/hom/eton.

— Tio ne MIR/IGAS min. Vi estas junaj ! Vintro estis ja malbelega : pluvo, neĝo, frostoj. Sed baldaŭ la dolĉa princo : Printempo, kun verdaj kaj rozkoloraj vestoj alvenos. Li alportos al ni beletajn florojn. La suno denove SEK/IGOS kaj VARM/IGOS la teron. Tiam ni faros longajn promenadojn sur la kamparo kaj ni gaje kantos :

Jen Printempo en SUNAER' Birdoj ekkantas por festi naskigon Jen Printempo en sunaer' Floroj ornamas tapiŝon de l' ter'.

Ĝis revido !

## Provizora KATO



## KLARIGOJ

FARTI : se porter ; ĈESTI : assister ; FARIGI : devenir ; TRAPASI : passer un examen ; CETERE : d'ailleurs ; JES JA : oui certes ; PLUV-OMBRELO : parapluie ; SURMETI : meti sur, mettre sur soi, porter ; MALSEKIGI : igi malseka, rendre humide, mouiller ; GAJIGA : qui rend gai ; MIRIGI : igi mira, étonner ; SEKIGI : igi seka sécher ; VARMIGI : igi varma, chauffer ; SUNAER' : suna aero, air ensoleillé, lumineux, chaud

ATESTO PRI LERNADO  
—  
Al S-ro VERDA NAZO  
Redaktoro de Nf. E.  
en Leadnesor.  
Verda Kato.

# En nia Federacio

Prezidanto : S-ro Albéric HUMEZ, 13 ter, rue Morel, à Douai  
Sekretario : Jak. CENTNERSVER, 9, rue Ferrand, à Valenciennes



## Komitata Kunveno en Saint-Omer la 7<sup>ma</sup> de Marto 1937

Tiu kunveno okazis en la grupejo de la Saint-Omer'a grupo (Komerca Cambro), sub la honora prezido de S-ro Ernest Deligny kaj sub la efektiva prezido de S-ro Albéric Humez.

Je la 10<sup>a</sup>, post saluto al ĉiuj ĉeestantoj, S-ro Albéric Humez malfermas la kunsidon. Pro neĉeesto de la ĝenerala sekretario, S-ro Claude Vernay konsentas igi sekretario de la kunveno.

La prezidanto konigus la senkulpigpetojn de pluraj gefederacianoj, kiuj ne povis ĉeesti la kunvenon : S-ro E. Durieux, honora prezidanto de la Federacio ; F-inoj F. Barret kaj A. Colléatte, vicprezidantinoj ; S-roj M. Duchochois, el Boulogne-sur-Mer ; H. Desmarest, el Huby-Saint-Leu ; J. Centnersver, ĝenerala sekretario de la Federacio ; Ch. Warusfel, federacia kasisto ; F. Charlet, el Hautmont ; F-ino Spyns kaj S-ro Maurice Nogé, el Dunkerque. Ĉiuj aldonis la esprimon de koraj sentoj al nia honora prezidanto, S-ro E. Deligny, okaze de la 35<sup>a</sup> datreveno de lia esperantista profesorigo.

1. La prezidanto prezentas viglan alvokon por la venontaj kongresoj :

a) **Federacia Kongreso en Amiens.** — Tiu kongreso okazos dimanĉon la 2<sup>o</sup> de Majo. La superaj ekzamenoj okazos la 1<sup>o</sup> posttagmeze, sub la alta direkto de S-ro G. Waringhien, prezidanto de la Esperanto-Instituto (la ekzamenotoj — devige unoj de orda federacio — antaŭinformu S-roon G. Waringhien, 47, rue de Douai, Lille, pri siaj intencoj) ; la konkurso por la « Fervorigilo » okazos dimanĉon la 2<sup>o</sup>, antaŭ la « ĝenerala kunveno » (la partoprenontaj grupoj antaŭinformu la prezidanton, 13 ter, rue Morel, Douai, laŭ la regularo de la Fervorigilo. Se necese, postulu tiun regularon de la prezidanto).

Ĝenerala kunveno : la gefederacianoj estas petataj konigi al la prezidanto, almenaŭ unu monaton antaŭ la kongreso, la demandojn kaj proponojn, kiujn ili deziras vidi sur la tagordo. Dum la ĝenerala kunveno, oni elektos (aŭ reelektos) la sekretariojn kaj kasiston ; eventualaj sia montru antaŭ la 2<sup>a</sup> de aprilo.

Deko da novaj aliĝoj estas kolektitaj inter la ĉeestantoj.

b) **Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo », en Parizo.** — Tiu kunveno kiu certe havos gravan influon por nia movado, okazos de la 14<sup>a</sup> ĝis la 17<sup>a</sup> de majo, en la kadro de la Pariza Internacia Ekspozicio.

La prezidanto insiste incitas la gefederacianojn ĉeesti multenombraj la Konferencon kaj montras la avantaĝojn, kiujn la kongresanoj ricevos kontraŭ la kotizo.

Li disdonas aliĝilojn kaj kolektas tiuj kelkajn aliĝojn.

c) **Universala Kongreso en Varsovio (7<sup>a</sup>-14<sup>a</sup> de aŭgusto).** — La rezultato de la voĉdono aranĝita de Generalo L. Bastien, prezidanto de I.E.L. ne estas duba : tiu kongreso estos la kongreso de ĉiuj esperantistoj.

La S.F.P.E. aranĝas vojaĝon. Postulu kondiĉojn de S.F.P.E., 34, rue de Chabrol, Paris (10<sup>e</sup>). La grava agentejo « Orbis » ankaŭ aranĝas vojaĝon (8-taga restado en Varsovio kaj halto por la vizito de Berlino). Postulu detalojn kaj kondiĉojn de S-ro Centnersver, ĝenerala sekretario de la Federacio, 9, rue Ferrand, Valenciennes.

2. **FEDERACIA KASO.** — La prezidanto montras la kontentigan staton de la federacia kaso, kiu enhavas pli ol mil frankojn.

La grupoj, kiuj ne ankoraŭ sendis siajn kotizojn al la federacia kasisto (Ch. Warusfel, Hôtel-de-Ville de Douai (Nord), Poŝta ĉekkonto, Lille 517-15) estas petataj tion urĝe fari.

3. **FUNKCIADO DE LA DIVERSAJ FEDERACIAJ FAKOJ :**

a) **IZOLULOJ.** — La prezidanto mallonge raportas pri la agado de S-ro Paul Brunet, kiu, bedaŭrinde ne ĉeestas la kunvenon (Vidu la lastan numeron de Nf. E.). La sukcesa agado de nia amiko, el kiu rezultos la starigo de pluraj novaj grupoj, meritas varman gratulon.

b) **RADIO.** — Letero de S-ro Maurice Nogé estas legata. Nia amiko Nogé plendas tute prave, ĉar li ne ricevas de la grupoj monatan raporteton pri radio.

Nia ĝenerala sekretario ankaŭ plendas ĉar li ne ricevas informojn de la grupoj pri ilia agado. Tiu informoj estas al li nepre necesaj por la redakto de la kroniko en Nf. E.

Ni insiste petas la grupgvidantojn sendi tre akurate monatan raporteton al la ĝenerala sekretario ; ili uzu por tio la foliojn kiujn ili ricevis.

c) BIBLIOTEKO. — La prezidanto legas la raporteton de S-ro Centnersver, kiu zorgas pri tiu fako. Ties funkciado estas kontentiga, sed la pruntotaj volumoj ne estas sufiĉe multnombraj. Librojn ni dankeme ricevus donace: antaŭe dankon!

d) EKSPŪZICIO. — La materialo estas en la manoj de Ges-roj Volqueman, en Lille. Ĝi estos uzata note por la budo de la Lille-a Komerca Foiro (Vidu poste!)

e) GAZETARO. — Pri tiu servo aperis en la lasta N.E. raporteto de S-ro Houze, kiu bedaŭrinde ne ĉeestas nian kunvenon. « Esperanto-Dunkerque » volonte liveras tulpretajn artikolojn al la federaciigitaj grupoj, kiuj postulas ilin.

f) INSTRUISTARO. — La prezidanto detale raportas pri la agado de S-ro Marcand kiu, lastan jaron, zorgis pri tiu fako.

El tiu raporto, rezultas ke ni ne plu povas konsideri S-ron Marcand, kiel federacian sekretarian por geinstruistoj: 1<sup>o</sup> ĉar li ne plu kunlaboras kun niaj neŭtralaj organizaĵoj (Federacio; S.F.P.E.; I.E.L.) kaj note ne plu estas ano de nia Federacio; 2<sup>o</sup> ĉar lia partia sintenado estas nepre neakordigebla kun la principo pri neŭtraleco kiu kuŝas en niaj statutoj.

Konsekvence, ne plu estas provizore federacia sekretario por la instruistaro. Ni estos feliĉaj elekti, por tiu ofico, unu el niaj federacianoj (profesoro aŭ instruisto) kiu konsentus kunlabori kun ni en la neŭtrala spirito de nia federacio kaj de nia nacia societo (kiu plene konsentas kun ni pri la ĉi-supra decido). Federaciano kiu povus preni sur sia la gvidadon de tiu federacia fako, estas petata sin montri al ni.

4. KOMERCA FOIRO EN LILLE. ESPERANTISTA BUDO. — La komerca foiro en Lille okazos de la 3<sup>a</sup> ĝis la 18<sup>a</sup> de aprilo. La esperantista budo en tiu foiro estos aranĝata de la Lille'a grupo. S-ro Volqueman konsentis fari la klopodojn ĉe la foira oficejo kaj zorgi — kun la helpo de S-ro Centnersver — pri la aranĝo de la budo. S-ro G. Chavet pruntedonos materialon (tablojn kaj seĝojn). La esperantistoj, kiuj povus deĵori en la budo, bonvolu sin turni al S-ro Volqueman, 36, rue Turgot, Lille, kiu aranĝos deĵorvicon.

La federacio invitas siajn membrojn kunveni en Lille, dimanĉon la 11<sup>a</sup> de aprilo por are viziti (posttagmeze) la budon, kaj la foiron.

Opa tagmanĝo okazos en « Le Foyer », je tagmezo akurate (Partoprenontoj, informu S-ron Volqueman, antaŭ la 9<sup>a</sup> de aprilo).

Notu ke komitata kunveno ne okazos tiun tago. La rendezvo estas « Le Foyer », 24, rue Gauthier-de-Châtillon, je tagmezo, akurate.

5. SINTENADO DE LA FEDERACIAJ GRUPOJ RILATE AL LA NENEŬTRALAJ SOCIETOJ. — Pri tiu grava temo, la prezidanto deziras klare esprimi sian opinion.

Kelkaj federaciaj grupoj inicialis aranĝojn kiuj estas neakordigeblaj kun niaj statutoj, ĉu sendante al nia federacio (konsekvence al S.F.P.E. kaj I.E.L.) la aliĝojn de nura parto de sia membraro kaj la cetera parto al neneŭtralaj societoj (note al F.E.T.), ĉu kreante urbajn aŭ regionajn organismojn (intergrupojn, komunajn ejojn, k. a.) por daŭra kunlaborado kun partiaj societoj.

Tiajn aranĝojn malpermesas niaj statutoj, kiuj asertas: 1<sup>o</sup> nian nepran neŭtralecon; 2<sup>o</sup> ke la grupoj devas doni al la federacio la aliĝojn de sia tuta membraro. La devo de la gvidantoj de la federacio estas prigardi la statutojn kaj la devo de la grupoj estas obei tiujn statutojn, kiuj estas por ĉiuj netuŝebla lego.

La prezidanto legas la leterojn interŝanĝitajn pri tiuj demandoj kun la S.F.P.E. kaj note kun S-ro J. Couteaux, ĝenerala sekretario de nia nacia societo, kiu akiris pri tiuj temoj altan sperton. El tiuj leteroj rezultas ke nia vidpunkto estas tute konforma kun la vidpunkto de S.F.P.E., kies konsilantaro ĵus alprenis la jenan decidon:

*Le Conseil de la S. F. P. E. rappelle aux fédérations et groupes, ainsi qu'aux sociétés spécialisées adhérentes, le 3<sup>e</sup> paragraphe de l'article 3 de ses statuts: « L'affiliation de ces trois sortes de groupements est globale, c'est-à-dire qu'une fédération est affiliée pour tous ses groupes, les groupes et sociétés pour tous leurs membres. »*

*Le Conseil rappelle également aux fédérations et groupes l'article 1<sup>er</sup> de ses statuts qui précise que la S. F. P. E. ne se propose aucun but politique ou religieux. En conséquence, tout accord temporaire établi en vue de la propagande espérantiste entre groupes de la S. F. P. E., et groupements politiques ou religieux, ne peut avoir lieu qu'en gardant à ces accords une base de neutralité absolue.*

Konsekvence: 1<sup>o</sup> Neniu grupo rajtas sendi al la federacio nur parton el la aliĝoj de siaj membroj kaj alian parton al neneŭtralaj societoj; 2<sup>o</sup> En la urboj aŭ regionoj kie ekzistas aliaj grupoj ol tiuj de nia federacio, ne povas esti starigataj konstantaj komitatoj, komunaj ejoj, k. a., kunligantaj grupojn de ambaŭ kategorioj. Kunlaborado povus ekesti inter tiaj grupoj, nur tre eksterordinare, dum nedaŭra tempo, kaj nur por manifestacioj havantaj tute neŭtralan karakteron.

Ni esperas ke ĉiuj grupoj lojale obeos tiujn decidojn, kiuj estas nur simpla plenumo de niaj federaciaj statutoj.

Cetere, tiuj niaj statutoj povas ĉiam esti ŝanĝataj, post voĉdono kaj decido de ĝenerala kunveno, se kvin grupoj tion proponas

(paragrafo 15<sup>a</sup>), sed, ĝis kiam niaj statutoj estos tiaj, kiaj ili estas, ĉiuj devas ilin nepre observi.

## 6. DIVERSAJ DEMANDOJ.

a) S-ro G. Degand, prezidanto de la Dunkerque'a grupo, incitas la federaciajn grupojn subvencii nian regionan gazeton *Nordfranca Esperantisto*-n, kiel faris la Dunkerque'a grupo. Eĉ malaltaj monhelpoj estos dankeme ricevataj.

Ni plene konsentas kun S-ro Degand. La bonega laboro de S-ro C. Vernay kaj de liaj kunlaborantoj tute meritas ĉies helpon.

b) Venonta komitata kunveno. Ne plu okazos komitata kunveno antaŭ nia ĝenerala kunveno en Amiens, la 2<sup>o</sup> de majo (vidu ĉi-supre).

La kunveno finiĝis je la 12<sup>a</sup>.

Post la kunveno, S-ro Deligny kondukis la ĉeestantojn al la urba biblioteko, kies ĉefa estro li estas. Oni admiris la trezorojn de tiu vasta biblioteko, note tre malnovajn kaj altvalorajn manuskriptojn kaj librojn, kio artaj bildetoj.

Tre bone aranĝita festeneto okazis poste. Je la finiĝo de la manĝo, oni trinkis la ŝampanvinon oferitan de S-ro Deligny, ĉaze de la 35<sup>a</sup> datreveno de lia esperantista profesorigo. S-ro Albéric Humez tiam ekparolis por esprimi al la jubileanto ĉies sentojn. Li dankis lin pro lia longa, bonega kaj fruktodona laboro por nia alero, deziris al li longan, sanan kaj pacan vivon kaj donsis al li, en la nomo de la tuta federacio belogan florgarbon.

Post travizito de la interese ga muzeo en Saint-Omer, kiu enhavas multajn altvalorajn, oni fine disiris.

Albéric HUMEZ.

## Tendaro por Junuloj ĉe la Orienta Marbordo

Oni proponas aranĝi, por esperantistaj knaboj kaj junuloj (14 ĝis 18 jaraĵ), tendaron apud Ipswich, Suffolk, ĉe la orienta marbordo de Anglujo, dum la lastaj dek kvin tagoj de aŭgusto. Specialan inviton oni jam sendis al niaj *Junior Members*, sed ĉiu esperantista junulo — ĉu komencanto aŭ spertulo — estos bonvena. Oni precipe bonvenigos atlandajn junulojn.

La kosto por la 15 tagoj estos proksimume 30 ŝilingoj, kiu enkalkulas la koston de manĝaĵoj kaj dormloko en tendo, sed ne sturkoston.

Interesatoj, bonvolu sendi nomojn kaj adresojn al la Sekretario, B. E. A., 142 High Holborn, London, W. C. 1, kiu dissendos petalojn, kiam la definitivaj aranĝoj estos faritaj. Plenaĝuloj kiuj deziras iel helpi, bonvolu skribi al la Sekretario.

## Redakcia Leterĝesto

Al B. G. en St-O. — Mi dankas al vi kaj esperas ke multnombraj ili sin abonos.

Al Hofa en Alger. — Mi faris tion kion vi postulis. Ĉu vi ne povus iom propagandi en Alger favore N.E.? Dankon!

Al F. H. — Pri « gastronomiaj aŭ kuir-artaj demandoj » petu al S-ro Humez. Li estas Majstro en tiu arto. — 2. Ne, profesoro Waringhien prizorgas ĉefe gramatikajn demandojn.

Al F. B. — Ne ankoraŭ. Verŝajne en Parizo dum la Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo ».

Al S. D. — Vi eraras. Tiun-ĉi jaron la Belga Kongreso okazos en Antverpeno. Jen la adreso: 44, Avenue De Bruyn, Wilryck-Antverpeno.

## Dernière Heure.

Le stand de la Fédération Espérantiste du Nord de la France, à la Foire Commerciale de Lille, portera le n<sup>o</sup> 304 et sera situé dans le Hall du Bureau Moderne.

Tous les espérantistes désireux de visiter la Foire peuvent se joindre aux membres du groupe de Lille, qui se réunissent le 11 avril, au « Foyer Lillois », où un repas en commun sera pris avant le départ à la Foire. — Prix: 5 ou 6 fr. (boisson non comprise).

Adresser sans retard votre adhésion (sans argent), à

M. Volqueman, 36, rue Turgot, à Lille.

*Nous devons faire paraître dans le numéro de Mai de N.E., sous la rubrique « Niaj Pioniroj » un article sur M. Alfred MICHAUX dû à la plume d'un de nos amis boulonnais, M. Baire. Or, au moment de mettre sous presse nous apprenons avec une grande tristesse la mort de M. Michaux, un des plus valeureux pionniers de notre mouvement, un de ceux qui l'honorèrent le plus, un de ceux pour qui nous avions le plus d'estime et de respect.*

*Nous perdons en Michaux, organisateur du premier Congrès Universel d'Espéranto à Boulogne-sur-Mer et ami de notre Majstro, une des forces les plus rayonnantes, les plus belles et les plus nobles de notre mouvement.*

*« Nordfranca Esperantisto », au nom de ses lecteurs, de notre Fédération et de tous les Espérantistes du Nord, s'incline respectueusement et présente à la famille de notre vénéré et regretté M. Alfred Michaux, ses plus sincères condoléances.*

LA RÉDACTION.

# Vivo de la Grupoj

## dum Marto

**ALBERT.** — *Du cycle de 20 leçons entreprises par Mlle Hansen, onze sont terminées. Depuis plusieurs séances Mlle Hansen, gravement malade, a été remplacée dans son cours. Mlle Dieulol, du groupe d'Amiens, continue les leçons. Elle doit être félicitée et remerciée, pour la promptitude apportée par elle, pour ne pas y avoir laissé un arrêt. 52 élèves suivent régulièrement la méthode enseignée.*

*Mercrédí dernier, un groupe a été constitué sous le titre « Groupe Espérantiste d'Albert ».*

*Voici la composition du Comité :*

*Président, M. Caron Ed. (trésorier des Jardins Ouvriers d'Albert), 9, rue Waldeck-Rousseau, à Albert ; vice-président, M. Cornil, dessinateur ; secrétaire, Mme Becquerelle, institutrice ; secrétaire-adjoint, Mme Courtois, institutrice ; trésorière, Mlle Boucly, dactylographe.*

*Membres, MM. Francony, ébéniste ; Caron Jean (atesto) ; Cambray R. (atesto) ; Mlle Hirson, institutrice.*

*Tous les souhaits de bienvenue vont à ce comité, qui saura amener de nouveaux adeptes à l'étude de notre belle langue.*

*Remercions aussi M. et Mme Lamant, d'Albert, d'avoir mis gracieusement une salle de réunion à la disposition du Groupe Espérantiste d'Albert.*

**ARRAS.** — La kursoj baldaŭ finiĝos. De la elementa ni ricevos kelkajn diplomitojn « pri lernado ». 6 pli malnovaj verd-ŝtelistoj sin preparas al superaj ekzamenoj ĉe kiuj, kiel ĉiujare nia grupo estos denove bone reprezentata.

— Sabaton la 3<sup>o</sup> de aprilo, S-ro Stuit prelegos pri Svedujo kaj projekcios lum-bildojn antaŭ la grupanaro. Tiu agrabla vespero komenciĝos je 20<sup>h</sup>30 en la komerca ĉambro.

— Dimanĉon la 18<sup>o</sup> de aprilo opa vizito de nia Muzeo sub la gvidado de F-ino Cary kiu montros niajn urbajn trezorojn, kun klarigoj, krompreneble en Esperanto.

La najbarurbaj esperantistoj estos plejkore akceptataj en tiuj du agrablaj kunvenoj. Ĉiuj el Marœuil, Aebécourt, Lens, Liévin, venu. Ni varme gratulas niajn du afablajn grupanojn pro ilia sindono.

— **RADIO.** S-ino Charmette akceptis esti grupa delegitino por radio.

**BOULOGNE-SUR-MER.** — La kurso gvidata de S-ro Kert daŭras kaj estas regule vizitata de fidelaj kaj seriozaj gesamideanoj.

— Okaze de la Internacia Ekspozicio kaj de la Konferenco « Esperanto en la Moderna Vivo », la gesperantistoj trapasantaj nian urbon ricevos ĉiujn necesajn scigojn ĉe la sekvantaj adresoj : Sekretariejo de la Esp. Grupo « Verda Stelo », 22, rue Victor-Hugo ; S-ro A. Le Petit, prezidanto de la grupo, 6, place du Palais de Justice ; S-ro Baire, U.E.A.-delegito, rue Dumont-de-Courset ; S-ro Haigneré, I.E.L.-delegito, 40, rue d'Ialy ; S-ro Duchochois, 18, place de Capécure.

**BRUAY** — Dimanĉon la 14<sup>o</sup> de marto okazis prelego pri Esperanto, en la urbodomo. Prezidis ĝin S-ro Gest, malnova samideano, kiu plezure denove partoprenas nian movadon. S-ro Brunet, paroladis pri Esperanto laŭ ĉiuj kutime prilaktataj vid-punktoj. Samtempe estis vizitebla ekspoziciejo de diversaj esperantistoj. Fine, li faris provlecionon laŭ rekta metodo. Kiel ĉiam en tiuj okazoj la ĉeestantaro laŭte kaj ĝoje respondadis al la demandoj.

Tiu propaganda kunveno estis zorge preparita de S-roj Flacziński kaj Bialasik, kaj ne estas dubo pri la sukceso de la nova kurso kiu komenciĝos tuj post la Paskolesto. Ĉi-jare nia federacio kalkulos novan grupon en sia sino.

La lecionoj okazos ĉiudimanĉe matene ekde Aprilo en Muzika Lernejo de Bruay sub lerta gvidado de S-ro Flacziński.

**DESVRES.** — La elementa kurso gvidita de S-ro Paëquentin ĵus finiĝis. Ĝi estis regule vizitata de 40 gelernantoj.

— La ĉiumerkredaj kunvenoj de la grupo daŭras en Centra Lernejo.

**DOUAI.** — Ĉiumerkrede F-ino Yolande Leveugle gvidas kurson en la grupejo kaj ĉiuvendrede okazas kurso gvidata de S-ro Albéric Humex en « Ecole Pratique ».

— Ekzamenoj por Atesto pri Lernado okazos en Aprilo aŭ Majo.

**DUNKERQUE.** — Mardon, la 9<sup>o</sup> de marto okazis parolado de S-ro Degand, nia prezidanto, pri la urbo « Arles » kaj la Rodana valo. Pro la malbelega vetero, nur dudek kuraĝemuloj ĉeestis tiun agrablan vesperon.

— Mardon, la 16<sup>o</sup>, S-ro Caubel, entuziasme, paroladis antaŭ trideko da fervoruloj, pri la celo kaj idealo de nia kara mondhelpingvo.

— La diversaj kursoj bone funkcias.

— Ĉiŝabate vespere, en « Café du Centre », gaja babilada kunveno. Ni petas ĉiun samideanon viziti tiun vere familian rondon. Bonvenon al ĉiuj. La 20<sup>o</sup> de marto vizitis ĝin afabla nederlando, maristo sur ŝipo *Andra*, kaj N. B., el Bulgarujo.

— Kun ĝojo, ni ekscias ke nia tre ŝatata grupano, S-ro Delacourt, resaniĝis de doloriga malsano.

**FRESNES - SUR - ESCAUT.** — Marto estis por nia grupo propaganda monato. Sur la muroj estis militaj propagandaj afiŝoj. Ĉiun merkredon dum la kurso, bela granda verda stela lumigas la Urbodomon por diri al la loĝantaro ke tie-ĉi estas Esperantujo.

— Deposte kvin monatoj 35 gesamideanoj abonas *Nordfranca Esperantisto*.

**JEUMONT-MARPENT.** — Vigla propagando. Plensukcesa balo, kiu alportis moralan kaj materialan profitojn al la grupo. Loka gazetaro favore akceptas artikolojn pri Esperanto.

— Ni provos aranĝi baldaŭ ekskurson al Nederlando.

**LENS.** — La distrikta Supera Kurso de S-ro Brunet estas regule vizitata de dudek esperantistoj. La elementa kurso vizitadas 15 gelernantoj.

— Ni petis subvencion de la Ekskurbatalantoj kaj de la Fajroestingistoj. De la urbestro, ni petis doni la nomon de Zamenhof al la strato.

— La grupkomitato decidis publikigi regulan esp. kronikon en la loka gazetaro.

**LIÉVIN.** — F-ino De Blook gvidas kurson por komencantoj ĉiujare en la urbodomo, je la 18<sup>o</sup> 30. Samtempe okazas kunveno de la malnovuloj.

— S-ro Darras Gustave, el Liévin, nuntempe soldato en Suresnes esperantistigis kelkaj kolegojn en kazerno.

**LILLE.** — La grupo vigle preparas la Esp budon ĉe la Komerca Foiro ; tamen ni ankoraŭ ne povas esti certaj ĉu ni havos senpagan budon. La grupanoj laŭvice deĵoros dum la tuta daŭro de la Foiro.

La 11<sup>o</sup> de aprilo okazos komuna tagmanĝo en « Foyer ». Poste oni kune vizitos la Foiiron kaj ni provos havi senpagan enirrajton.

**SAINT-OMER.** — La urba kurso okazas ĉiujare je la 19<sup>o</sup>. La unuan jaŭdon de ĉiu monato, kunveno de la malnovaj anoj : babilado, tradukado, ludoj.

— En la liceo la kurso laŭ rekta metodo tre kontentige progresas kun ĉirkaŭ 40 gelernantoj.

**VALENCIENNES.** — Nova sekretario de la grupo, S-ro Rémy Huin, nune kaporalo en Boulay (Moselle). Ĝis lia baldaŭa reveno ĉiuj korespondantoj por la grupo devas esti sendataj al S-ro Jak Cent, 9, rue Ferrand.

— En la kazerno, S-ro Huin sukcesis malfermi kurson kiu okazas en la magazeno kaj kiun vizitas regule 15 soldatoj.



Ges-roj Jak CENTNERŠVER estas feliĉaj sciigi vin pri la naskiĝo de ilia filo

JOSEFO - SAMUELO

Valenciennes,  
la 20<sup>o</sup> de Marto 1937

**NORDFRANCA ESPERANTISTO** prezentas siajn plej korajn gratulojn al la gepatroj kaj bondezirojn al la estonta esperantisto.

## Cours d'été

*Dans notre prochain numéro de mai, nous publierons le programme des Cours d'été, qui auront lieu du 19 au 30 juillet, à EOLE, Digue de Mer, à MALO-LES-BAINS.*

*Ces cours seront guidés par notre sympathique professeur hollandais Henk Thien.*

## Aux abonnés de « Pikarda Stelo »

*Ce bulletin termine le service de votre abonnement.*

*Si vous n'êtes pas encore abonné à N.E., envoyez sans retard votre abonnement à S-ro VERNAY, 33, rue Marceau, Rosendael-lez-Dunkerque (Chèques Postaux : Lille 403.50). Prix : 10 francs pour un an.*

Uzu kaj praktiku Esperanton internacie... KORESPONDU!

# 18<sup>a</sup> Nordfederacia Kongreso

## Ordre du Jour :

1. Allocution du président ;
2. Rapport du secrétaire général ;
3. Rapports des secrétaires spécialisés (radio, bibliothèque, exposition, presse, isolés) ;
4. Rapport du trésorier ;
5. Election des secrétaires et du trésorier fédéraux ;
6. Lieu du prochain Congrès fédéral (22 mai 1938) ;
7. Questions diverses.

## Kongresalvoko

Vastega estas nia familia rondo kaj ni familianoj kun ardanta idealista flamo en la koroj, ni ne konas nin. Tamen reciproke ni ĉiuj deziras nin koni kaj interligi pere la tutmonda ligilo kiel eble pli forte, krei pli taŭgan amikan atmosferon ne sole per ni persone, sed ankaŭ per tiuj kiuj venas tuj post ni, kiuj estos niaj estontaj gvidantoj, niaj semantoj — la bazo de la Esperanto triumfo.

Jen alproksimiĝas solena tago, vigligu ni !

Unua kaj dua de Majo estas la du kongrestagoj. Amiens estas la loko kie ni devas nin renkonti kaj interkonatiĝi, kie nia federacia kongreso kunigos konsiderindan nombron de esperantistoj. Ne preterlasula okazon.

Ĉar vi deziras ilin renkonti kaj konatiĝi kun ili.

Do, aliĝu al tiu nordfederacia kongreso kaj vi havos la neoftan feliĉon agrable travivi du tagojn en vere amika kaj internacia rondo kie antaŭ vi pli larĝe sin malfermos la horizonto kaj tio permesos al vi aldoni la necesan valoron al tiu kongreso.

De kiu vi akiros novajn spiritfortojn, sperton kaj entuziasmon, tiel utilaj por nia kara lingvo kaj societa laboro.

Urgas aliĝi, aliĝu, aliĝu !

## PROGRAMME

### Samedi :

- 15 h. Examens de la S. F. P. E. (Hôtel-de-Ville) ;  
20 h. 30 Réunion amicale (Hôtel Bellevue) ;

### Dimanche :

- 9 h. Concours « Fervorigilo » (Hôtel-de-Ville) ;  
10 h. Assemblée Générale (Hôtel-de-Ville) ;  
12 h. Photographie ;  
Visite de la Cathédrale ;  
13 h. Banquet « Le Royal » 62, rue des Trois-Cailloux  
15 h. 30 Matinée Récréative, Concert et Sauterie 55, rue des Capucins.

### Akceptejoj :

**HOTEL BELLEVUE**  
1 et 3, Rue Vulfran-Warmé

## Ekzamenoj de la S. F. P. E.

Kiel kutime, ekzamenoj okazos sabate la 1<sup>an</sup> de Majo.

Por la supera lernado kaj la kapableco, la kandidatoj provos la skriban parton antaŭe en la diversaj urboj kie sidas esperanta grupo. Restos nur en Amiens la parola parto.

El ĉiu ebla loko, oni devas sendi al F-ino Colléatte, la nomojn de la kandidatoj, la ekzamendatojn kaj la adresojn de la gvidantoj.

La sciigoj estos transdonitaj al S-ro Waringhien, kiu sendos la ekzamentekstojn al la gvidantoj.

Sendi la demandojn antaŭ la 8<sup>an</sup> de Aprilo por ke la ekzamenoj okazos antaŭ la 15<sup>an</sup>.

## Adhérents au Congrès

### (PREMIÈRE LISTE)

1. s-ino Humez,	Douai
2. s-ro Degand,	Dunkerque
3. s-ro Humez,	Douai
4. s-ro Houzé,	Dunkerque
5. s-ro Charlet,	Hautmont
6. s-ro Halgrain,	—
7. f-ino Leveugle,	Douai
8. s-ro Demoulin,	—
9. s-ro Waringhien,	Lille
10. s-ro Prangère,	Douai
11. s-ino Prangère,	—
12. s-ro Merle, (Commandant)	—
13. s-ro Curnelle,	Lille
14. f-ino Spyns,	Dunkerque
15. s-ro Marie,	Avesnes
16. s-ro Le Petit,	Boulogne
17. s-ro Vernay,	Rosendaël-Dunkerque
18. s-ro Delavigne,	Longpré-les-Corps-Sts
19. s-ino Delavigne,	—
20. s-ro Leroy,	Hautmont
21. f-ino Tyveyra,	Arras
22. f-ino Karcher,	—
23. s-ro Mercier,	Hautmont
24. s-ro Ronvery,	Maubeuge
25. s-ro Broutin,	Pont-sur-Sambre
26. s-ino Broutin,	—
27. s-ro Buronfosse,	—
28. s-ino Buronfosse,	—
29. s-ro Centneršver,	Valenciennes
30. s-ro Guillaome,	Paris
31. s-ino Ramparoux,	Jeumont
32. s-ro Brunet,	Arras
33. f-ino Lognon,	—
34. s-ro Desmaret,	Huby-Saint-Leu
35. s-ro Dumarquez,	Desvres
36. s-ino Dumarquez,	—
37. s-ino Arnaud,	Hénencourt
38. s-ro Arnaud,	—
39. s-ro Calon,	Albert
40. s-ro Duchochois,	Boulogne
41. f-ino Pannevin,	—
42. f-ino Bayeux,	—

43. s-ro Hennechart,	Albert
44. s-ro Starcek,	—
45. f-ino Hisson,	—
46. f-ino Bouchy,	Albert
47. f-ino Legendre,	—
48. f-ino Jourdain,	—
49. s-ro Cornil,	—
50. s-ino Courtois,	—
51. s-ro Courtois,	—
52. s-ro Morlighem,	Liévin

voir suite page 15.



## DU MIRINDAĴOJ

Inter akvo kaj ĉielo,  
Mirindaĵo vere dia,  
Punt' el ŝtono kaj juvelo,  
Jen la Katedralo nia.

Same, kiel ĝi, modelo  
De elegantec' gracia,  
Montras sin, sub verda stelo,  
Komprenil' internacia.

Dank' al tio, en Francujo,  
La ĉefurb' de Pikardujo  
Tiom estas vizitinda.

Kiom de nun Esperanto  
Melodia kiel kanto,  
Iĝas ĉie parolinda.

F. MAETZ.



AMIENS - La Rue Basse des Tanneurs

LEGU la ESPERANTAJN LIBROJN

# Dans la Presse française

Du *PROGRES DE LA SOMME* :

## UN CONGRES PEU ORDINAIRE

De très nombreux congrès nationaux et internationaux siégeront à Paris, de mai à novembre prochain, dans le cadre de l'Exposition internationale des arts et des techniques.

Parmi ces congrès, il en est un qui se distinguera nettement des autres parce qu'il présentera deux caractéristiques bien spéciales : celle de réunir toutes les nuances de la pensée contemporaine et celle de grouper des congressistes d'une trentaine de pays parlant tous la même langue.

Il s'agit de la Conférence internationale « L'Esperanto dans la vie moderne », placée sous le haut patronage de M. Albert Lebrun, président de la République. Le Comité d'organisation de la Conférence est présidé par M. André Baudet, ancien commissaire général du Gouvernement français pour l'Exposition Internationale de Bruxelles.

La première section de la Conférence est présidée par M. Pariselle, recteur de l'Académie de Besançon. Elle vise tous les aspects de l'enseignement scolaire et post-scolaire, échange d'élèves, etc.

La seconde section de la Conférence, présidée par M. Raoul Dautry, directeur général des Chemins de Fer de l'Etat, s'intéressera à tous les aspects des échanges commerciaux.

La troisième section de la Conférence, présidée par M. A. Cotton, vice-président de l'Académie des Sciences, se préoccupera des découvertes scientifiques et de leur application à la technique moderne.

La quatrième section, enfin, présidée par M. Henri Bonnet, directeur de l'Institut international de coopération intellectuelle de la Société des Nations, recherchera les possibilités de faciliter les échanges intellectuels entre les divers pays, par le théâtre, la radio, le cinéma, la presse, les lettres, les arts, etc.

La Conférence se tiendra du 14 au 17 mai, à la Maison de la Chimie, 10, rue Saint-Dominique. La seule langue employée par les participants venus aussi bien des Etats-Unis que de la Turquie, de Suède comme d'Italie, sera la langue auxiliaire internationale esperanto, qui montrera ainsi ses titres éminents de langue d'échange pour toutes les expressions de la pensée moderne.

Ceux de nos lecteurs que la question intéresserait tout spécialement pourront demander des renseignements complémentaires auprès du secrétariat général de la Conférence, 34, rue de Chabrol, Paris (10<sup>e</sup>).

## UN VOCABULAIRE TECHNIQUE INTERNATIONAL

Il y a fort longtemps que les savants et techniciens de tous pays éprouvent le besoin de « normaliser » les termes techniques employés dans les différentes langues et dont la diversité constitue au moins une sérieuse gêne pour les différents spécialistes. La terminologie actuelle est une source constante de confusion.

« La langue scientifique est une langue mal faite », dit M. Bouasse, doyen de la Faculté des Sciences de Toulouse.

Cet étalon peut-il donc être une langue nationale ? Dans une conférence faite en 1920 devant la Société d'encouragement pour l'industrie nationale, le regretté Charles Richet, membre de l'Institut, a d'ailleurs, péremptoirement démontré l'impossibilité pour une langue nationale de jouer ce rôle d'étalon. Et puis laquelle ? Le français ? L'anglais ? L'allemand ? Chacune fait valoir ses titres, évidemment. Comme le remarque le docteur E. Wüster, (Compte rendu des travaux du Congrès international d'électricité, Paris 1932), « une langue auxiliaire permettrait, au contraire, de sortir des limites imposées actuellement à l'élaboration des vocabulaires techniques souvent imprécis et qui n'assurent ni l'unification des idées, ni celle de la compréhension des termes ».

De nombreux congrès internationaux de savants ou de techniciens se sont prononcés de façon analogue. Et puis, peut-on « résoudre », comme le dit encore M. Bollet de l'Isle, « à voir se créer le monopole de fait d'une nation mieux organisée que les autres, et dont la langue risquerait alors de s'imposer comme unique langue scientifique, au grand détriment intellectuel des autres peuples ? » Injustifiable inégalité.

C'est le mérite de E. Drezon, de l'Académie des Sciences de l'U. R. S. S., d'avoir proposé à l'International Federation of Standardizing Associations (I.S.A.) — Congrès de Stockholm 1934 — de mettre à l'étude un Code de Terminologie internationale (C.T.I.).

La base de cette terminologie internationale serait l'esperanto.

## DANS LES GRANDES FOIRES

A la suite des résultats extrêmement satisfaisants obtenus par l'emploi de la langue auxiliaire à la Foire de Rio-de-Janeiro (mi-octobre à mi-novembre de chaque année), de grandes affiches ont été éditées en langue nationale et en esperanto, et la « Ligue espérantiste brésilienne » sera officiellement représentée à titre permanent au sein du Conseil pour le tourisme et les foires commerciales.



## KIEL ONI TRANSDONAS LA ORDONOJN

La Kapitano al ĉefserĝento :

— Kiel vi ja devas scii, morgaŭ okazos suneklipso. Ĉar neofte tio okazas, je la kvina matene, la soldatoj surhavantaj la militvestojn iros al la ekzercejo. Tie ili povos ekvidi la maloftan fenomenon kaj mi donos al ili la necesajn klarigojn. Se pluvos oni povos nenion vidi. En tiu kazo diru al la soldatoj ke ili restu en la kunvenĉambro.

La ĉefserĝento al serĝento :

— Laŭ rekomendo de la kapitano; morgaŭ matene je la kvina, okazos suneklipso militvestita. Kapitano donos al la ekzercejo la necesajn klarigojn kaj tio okazos neofte. Se pluvos oni nenion povos vidi. En tiu-ĉi kazo la malofta fenomeno okazos en la kunvenĉambro.

La serĝento al kaporalo :

— Laŭ ordono de la Kapitano, morgaŭ matene je la kvina, komenco de la suneklipso en la ordinara ekzercejo. Soldatoj militvestitaj. Se pluvos, kaj tio okazos neofte, la kapitano donos en la kunvenĉambro la necesajn klarigojn pri tiu malofta fenomeno.

La kaporalo al soldatoj :

Morgaŭ je la kvina matene, la kapitano eklipsigos la sunon kun la

necesaj klarigoj. Se pluvos, tiu malofta fenomeno okazos militvestita kaj ni povas diri ke nur malofte oni povas tion vidi.

Buŝgulo al Dikventrulo :

— Morgaŭ matene je la kvina, en la ekzerĉambro, la suno militvestita donos klarigojn al la Kapitano kaj tiu malofta fenomeno kiu okazas neofte estos eklipsigata en la ekzercejo.

VERDA NAZO.

## ANEKDOTOJ

### EN LERNEJO

*Profesoro* : Ĉu iu povus diri al mi kio estas, la luno aŭ la suno, pli utila al homaro ?

*Toto* : Mi ! sinjoro. Estas la luno.

*Profesoro* : Kial do ?

*Toto* : Tial ke luno lumigas nin dum la nokto, kiam estas malhelo ; dum la suno nin lumigas dum la tago kiam oni ne bezonas lumon.

★

### EN LA POŝTOFICEJO

Kliento al poŝtoficistino, ĉe la ĝiketo :

— Jam de unu horo mi estas ĉi tie, fraŭlino.

— Mi, estas jam de ses monatoj !

## KONSILOJ AL PROPAGANDISTOJ

La plej seriozaj verkistoj, eĉ filozofoj ludas kelkfoje kaj per kio ? per konkoj ; ĉe fino de verko, ili KONKLUDAS.

★

Ŝatantoj de ludkartoj kiu estas la karto kiu kuras plej bone ?

Vi diras ke neniu karto kuras ; tamen oni diras ofte kuri kiel aso, aŭ mallongigite. ASEKURI.

A. CHAIGNEAU.



## RADIO-AŬSKULTANTOJ...

Estu ĉe via aparato la **15<sup>an</sup> de Aprilo**, je 21<sup>h</sup>20 ĝis 22<sup>h</sup>,  
Vi aŭdos belan esperantan teatraĵon de ĉekaj stacioj (**PRAHA, BRNO, BRATISLAVA**).



# La Runa Skribo

## 1. LA ĜERMANAJ RUNOJ.

Unu el la kulturaj fenomenoj, kiuj pruvas ke la ĝermanaj popoloj en ilia pagana epoko havis altan spiritan nivelon, estas la fakto, ke ili posedis propran skribon: la runojn.

La runa skribo estas alfabeto konsistanta el 24 literoj, kies karaktera trajto estas la manko de rondaj kaj horizontalaj strekoj. La deveno de la runa skribo estas kaŭzo por multa sciencista diskutado. Kelkaj volas derivi la runojn de la fenica skribo, kelkaj de la greka, de la latina aŭ de ambaŭ, kaj malmultaj ĝermanaj pseŭdo-sciencistoj eĉ asertas, ke la runoj estas aŭtoĉtonaj kaj pli malnovaj ol la aliaj skriboj. Tamen ekzistas unu teorio, kiun la granda lingvisto dana Ludv. Wimmer, jam en 1874 kreis kaj kiu ĝis hodiaŭ ne povis esti renversata de la alia esploristo. Wimmer derivas la runojn de la latina skribo kaj sukcesas klare kaj konvinkte starigi la rilatojn inter la latina kaj la runa alfabetoj. Sur ĉi-kuna ilustraĵo videblas la runoj en sia propra slusekvo, sub ili la korespondantaj latinaj majuskloj kaj sube la prononco. Por kompreni la korespondadon estas necese scii, ke la runoj plejparte estis gravurataj en lignon. (En la ĝermanaj lingvoj la vorto por «libro» estas la sama aŭ derivaĵo de la vorto por «fago»: book, bok, buch). Se oni skribis sur lignaj tabuletoj kun vertikalaj fibroj, estis neeble gravuri horizontalajn aŭ rondajn strekojn, kaj pro tio oni

### LA ĜERMANAJ RUNOJ

F R N T P R < X P : H + I 4 J M Y S : T B M M T G R M

Deveno:

F U D A R C X Q H N I G Y P Z S T B E M L < O M

Prononco:

f u t h a r k g w : h n i j - p z r s : t b e m l n g o d

Tekstoj:

IN < N M P P X A S T I T : H R T I S P T H A R I A : T P P I M R / 2 B Q S R : P R A M T : A N I F

LIK HLEWAGASTIR HOLTINGAR HORNATAVIDO, tio signifas MI HLEWAGASTIR HOLT-ano la KORSON FARIS. La enskriboj laŭ la enhavo do ne estas tre interesaj, sed ili donas al ni la konon de la plej malnova stato de la ĝermanaj lingvoj. Tri trovaĵoj ankoraŭ estas menciendaj, ĉar ili pruvas la uzadon de la sama alfabeto en la tuta tiam tre granda teritorio de la

modifis la latinajn model-literojn. Nun facile kompreneblas: F D A R C H I S T B. Duone renversita estas E, kaj tute renversita U L. Por eviti, ke du literoj tro intersimilas, oni iomete ŝanĝis: N pro H, M pro E, O pro ng. Novaj kreaĵoj estas X, kiu konsistas el du C, ng kiu konsistas ankaŭ el du C, kaj d kiu konsistas el du D. Restas nur P G Y Q Z, kies klarigo prenas tro da spaco, sed kiuj ankaŭ estas tute konvinkaj. Pri la prononco estas dirende ke th, g, h kaj d estas spirantoj, kiuj ne ekzistas en la franca aŭ en Esperanto.

La epoko, kiam la runoj estis ekuzataj de la ĝermanaj popoloj estas laŭ sufiĉe ĝenerala koncepto la dua jarcento. La loko ankaŭ estas necerta; oni ofte supozas, ke gota popolo apud Nigra Maro adaptis la runojn kaj komunikis ilin laŭ Danubo al la parencaj popoloj. La disvastiĝo de la runoj estas miriga. Ĉiuj ĝermanaj popoloj konis ilin: la gotoj sur Balkano, la ĝermanoj en Germanujo kaj Francujo, la angloj kaj la skandinavo. La nombro de runaj tekstoj tamen estas tre malgranda kaj ili estas mallongaj. Estas nur juveloj aŭ armiloj kun malmultvorta aŭ unuvorta teksto kiujn ni posedas. Ekzemple ringo el Bukarest kun gota enskribo: SANKTA DIO DE LA GOTOJ, aŭ fibolo (agrafo) el ĝermana regiono kun la surskribo (la dua skribo sur la ilustraĵo): BOSO WRAET RUNA tio signifas BOSO SKRIBIS LA RUNOJN. Tre fama estas la teksto sur la ora korno de Gallehus el suda Danujo (la unua teksto sur la ilustraĵo):

ĝermanaj popoloj kaj krome konigas al ni la fiksitajn sinsekvojn de la literoj. Estas brakteato (ora plateto uzata kiel juvelo) el Vadstena en Svedujo, due fibolo el Charnay en la Bourgogne kaj trie glaveto el la Tamizo en Anglujo. Sur tiuj tri trovaĵoj estas engravurita la runa alfabeto kaj nur malgrandaj diferencoj estas inter ili. La uzado de la runoj de la gotoj ne

daŭris tre longe. Jam en la kvara jarcento ilia episkopo Wulfila, kiu tradukis la biblion en la gotan lingvon, kreis el la latina, greka kaj runa alfabetoj, novan gotan alfabeton, kiu tute forigis la runojn. Ankaŭ en Germanujo la runoj devis true cedi al la latina alfabeto, kiun la mislistoj divastigis. La plej malnova ĝermanlingva literaturo (el la 8<sup>a</sup> jarcento) jam estis skribita latinlitere. En Anglujo la runa skribo estis komence tre prospera. La nombro de runoj plaltiĝis ĝis 33 por bone reprezentii ĉiujn anglajn sonojn. Tamen jam la unuaj pergamentaĵoj estis skribitaj latinlitere, sed oni enkondukis kaj uzis dum la tuta malnovangla periodo du runajn signojn por la sonoj de th kaj gh

en la latina alfabeto. Tamen ni ankoraŭ havas en Anglujo kelkajn kaj en St Gall unu runan alfabeton, kiujn monakoj skribis verŝajne pro plezuro.

Alie la runa skribo evoluigis en Skandinavujo. Tie la runoj estis multe uzataj jam en la plej malnova epoko, poste ili iom post iom ŝanĝiĝis kaj la rezulto estis modifita runalfabeto el 16 literoj. De 400 ĝis 600<sup>a</sup> proksimume oni tie uzis la ĝermanajn runojn, de 600-800 ŝanĝoj enpenetris kaj deposit 800 estis la ora epoko de la nordaj runoj. Por diferencigo de la nordaj runoj oni nomas la pli malnovajn komunĝermanajn runojn: ĝermanaj runoj. La sekvonta artikolo temos pri la nordaj runoj.

Artbur BAUR.



Ĉiuj en AMIENS

la 2<sup>an</sup> de Majo 1937 L...

## Adhérents au Congrès

suite (voir page 11)

53. f-ino Morlighem,	Liévin
54. s-ro Bialasik,	Houdain
55. s-ro Flaczynski,	—
56. s-ino Vanherseeke,	Coudekerque
57. f-ino Debloek,	Dunkerque
58. s-ro Deligny,	Saint-Omer
59. f-ino Deligny,	—
60. s-ro Max Mendlewicz,	Lens
61. s-ino Mendlewicz,	—
62. s-ro Warusfel,	Douai
63. s-ro Vanhove,	Dunkerque
64. s-ino Vanhove,	—
65. s-ro Le Moine,	—
66. s-ro Beauchamp,	Albert
67. f-ino Choque,	—
68. s-ro Irlande,	Poix
69. s-ino Irlande,	—
70. f-ino Dumez,	Dunkerque
71. s-ro Léchelle,	Anzin
72. s-ro Capiez,	—
73. s-ro Lekieffre,	—
74. f-ino Beltman,	La Madeleine
75. f-ino Vanhove,	Dunkerque
76. f-ino Kiesecoms,	—
77. s-ino Vernay,	Rosendaël-Dunkerque
78. s-ro Leloir,	Saint-Pol-sur-Mer
79. s-ro Bricourt,	Caudry
80. s-ino Victor,	Amiens
81. f-ino Chantemesse,	—
82. s-ino Ricquier,	—
83. f-ino Serrassaint,	—
84. f-ino Kerskaw,	Villers-Bretonneux
85. f-ino Duben Suzanne,	Amiens
86. f-ino Duben Lucie,	—
87. f-ino Colléatte Alice,	—
88. f-ino Colléatte Julienne,	—
89. f-ino Dieulot,	Amiens
90. s-ro Dieulot,	—
91. f-ino Lœneville,	—
92. s-ro Moitié,	—
93. s-ino Ferleu,	—
94. s-ro Hivier,	Frucourt
95. s-ro Dufour,	Abbeville
96. s-ro Charmette,	Arras
97. s-ino Charmette,	—
98. s-ro Falet,	Amiens
99. s-ro Gabriel,	Bus-les-Artois
100. f-ino Petit,	Amiens
101. s-ro Despinoy,	—
102. s-ino Braure,	Dunkerque
103. f-ino Lavallart,	Amiens
104. f-ino Julliard,	—
105. s-ro Descamps,	—
106. s-ro Roger,	Arras
107. s-ro Caron Jean,	Albert
108. f-ino Lefebvre Marcelle,	Amiens
109. s-ro Tauré,	—
110. s-ro Samtes,	—
111. s-ro Bourlon,	—
112. f-ino Troude,	Boulogne-sur-mer
113. f-ino Panier,	Albert
114. s-ro Nicolo,	Amiens
115. s-ro Hazard,	—
116. s-ro Marquant,	—
117. s-ino Marquant,	—
118. s-ino Becquerelle,	Albert
119. s-ro Bouscant,	Forceville
120. f-ino Andrazenjenski,	Amiens
121. s-ro Pecquery,	—
122. s-ro Colussy,	—
123. s-ro Thiennot,	—
124. s-ino Thiennot,	—
125. s-ro Roussel,	Longueau
126. f-ino Bruche,	Albert
127. f-ino Lannivette,	Longueau
128 à 137. Groupe de Fresnes-sur-Escaut	—
138. f-ino Huysentruyt	Amiens
139. s-ro Azambre	Avesnes
140. s-ino de Luca	—
141. s-ro de Luca	—

à suivre.



Hôtel recommandé :

## HOTEL DE FRANCE

Rue de l'Hôtel-de-Ville, ABBEVILLE

DINGUARD. Propriétaire - Téléph. 42

## RADIO-APARATO « RENOVOX »



Preciza reguligo  
Bela aspekto  
ALTKVALITA MATERIALO  
6 lampoj  
CIAJ ONDOJ  
Variebla Selekteco  
Amerikaj lampoj  
Mozgrandaj trekvecoj  
(kun fero)  
465 kilocikloj

Antaŭ-selektigilo efika  
Diverskolora cifereplato  
7 kaj 14 kilocikloj po komutatoro  
Luma akord-indikilo  
Duobla toneco - Elektro-dinamo  
Grandmodela laŭparolilo, haviganta  
nekompareblan muzikecon, kiu igas tiun  
modelon vera radio-aparato de muzikamantoj

PREZO : 2.035 FR.

10 % -a rabato por Nf.E-abonantoj

Anciens Etablissements

## Lavoix & Renouard

49ter, Rue d'Arras - DOUAI

## ESPERANTO - ĈAMPANO

Grand 1<sup>o</sup> cru - Unua Vinberregiono  
Klasigita en 100 % kategorio

Laŭ gusto : Dolĉa : Duondolĉa ; Mالدolĉa

Prezoj en Heims :

Carte verte (verda kapuĉo) po botelo 10, fr. fk

Mendu al samideano

R. CHANCE, 3, rue René-Bourgeois, REIMS (Francujo)

Pago al R. Chance, Mailly-Champagne (Marne)

Poŝtĉek-konto : Nancy 334-72

## M. MAX TAILLEUR

16, Rue Gambetta  
LENS (P.-de-C.)

Téléphone 603

EXPORT

BRAUNIA

Buvez les bonnes Bières  
de la Brasserie CARLIER  
11, rue Félix-Faure, COUDEKERQUE-BRANCHE

R. C. 808 - Tél. 570 Dunkerque

Elles sont livrées partout et chez tous  
en fûts et en bouteilles

BOCK LUXE

BOCK IDEAL

## Hôtel-Pension "EOLE"

Madame PESSEY

158, 159, 160, Digue de Mer  
MALO-LES-BAINS (Nord)  
Téléphone 13.25

Vue magnifique sur la mer  
Eau courante chaude et froide  
dans toutes les chambres  
Salles de Bains - Garage  
Réduction 5% aux Espérantistes  
Espéranto parolata

## PORTO VASMONTÉ

H. DE VASCONCELLOS, O. PORTO

Agent général : C. DOLPHENS

39, rue Gustave-Jonquet, à LILLE

## Nordfranca Esperantisto

*est envoyé chaque mois*  
à titre de propagande, à de nombreuses  
Sociétés, aux Syndicats d'Initiative, aux  
Chambres de Commerce, aux principaux  
Fonctionnaires, Consuls, Négociants, Indus-  
triels, Hôteliers, Coiffeurs, à de nombreux  
Groupes Espérantistes de France et de  
l'Étranger.

Fait un service régulier d'échange avec  
les autres journaux.

**SI** vous faites insérer  
une annonce à cette place,  
elle sera certainement remarquée...

PETITE DÉPENSE  
GROS PROFIT

Tous renseignements :

Imprimerie de "Nordfranca Esperantisto"

2<sup>a</sup> Serie - 14<sup>a</sup> Jaro


N° 7

MAJO 1937

# NORDFRANCA

# ESPERANTISTO

(PIKARDA STELO - NORDA GAZETO - ANTAŬEN)



## MONATA REVUO

de la Nordfrancaj Esperantistoj

Publikigas la sciigojn de la Norda Federacio  
kaj de la Grupoj

## REVUE MENSUELLE

des Espérantistes du Nord de la France

Publie les renseignements  
de la Fédération du Nord et des Groupes



Redaktejo kaj administrejo : 33, rue Marceau  
ROSENDAEL - LEZ - DUNKERQUE (Nord)

C. VERNAY, Direktoro

G. VANHOVE, Administranto

M. DELAVIGNE, Respondeca redaktoro

Redakta Komitato, redaktas

Jarabono : Francujo 10 frankoj  
aliaj landoj : 8 respondkuponoj aŭ egalvaloro  
POŬTĈEKKONTO : LILLE 403-50